

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de I.K.U.E. ★

==== ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPÉRANTO ===

Prezidanto : S-ro R.C1. COLAS,- 6, rue de Mézières,- 75006 PARIS.
Sekretario : S-ro Jean BARRIER,- 89, rue Salengro,- 93700 DRANCY.
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS.

C.C.P.- Association Catholi. Franc. pour l'Espéranto -BOUEN 23-24-25 K.

==== le N° : 1 Fr- : === Abono : 4 Fr- : kateze : 1 Fr : Sume : 5 Fr

....., , , same as ill.

Redaktörin : Sino J. VINCENT, rue des Oiseaux - 27700 LES ANDELYS

Sendu la materialon por la bulteno antaù la 20-a de martó, la 20-a de junio, la 20-a de septembro, la 20-a de decembro.

Sankta PTO X-a preâu par ni

--- Oktober 1972 ---

E N H A V O

- | | | |
|---------|--|-----------------------------|
| Paĝoj : | 2 & 3 : Bileto de la prezidanto | " 12 : informoj |
| " : | 3 & 4 : La aganta spirito. Meditado | " 13 : Nekrologo |
| " : | 4 : Gute da amo R.D. | " 13 : Fonduso-Domo |
| " : | 5 : Ĉe la junuloj J.M. G. | " 13 & 14: Zamenhof |
| " : | 5 & 6 : Kongresaj raportoj: Ĉomo, Portland | " 4 : Nia membroaro |
| " : | 10 : Lingva angulo | " 7/8/9 : ilustritaj paĝoj. |
| " : | 11 : Protokolo de la komitatkunveno | " 14 : kotiztabelo |

La venonta komitatkunveno okazos ĉe Chabrol la 26/11/72 je la 15-a. Iu ajn membro povas ĉeesti kiel observanto.

11. The following table shows the number of hours worked by 1000 employees in a company.

BILETO DE LA P R E Z I D A N T O

=====

Mademoiselle Yvonne Paulier nous a quittés. Pour tous ceux qui avaient des contacts avec les services de l'Union Française pour l'Espéranto, pour tous ceux que notre action amenait aux locaux de la rue de Chabrol, elle était la discrète interlocutrice, toujours prête à aider, à informer, toujours dévouée et patiente ...

Le Bureau de l'Association Française Catholique pour l'Espéranto a souvent bénéficié de son accueil, et nous lui sommes reconnaissants de tout ce qu'elle a fait pour nous aider.

A l'U.F.E., dont elle était la Secrétaire Administrative, nous adressons ici l'expression de notre sympathie, et nous partageons le deuil qui frappe, en la personne d'un membre de notre Association, tous les Espérantistes Français.

* Un certain nombre d'entre nous se sont retrouvés parmi la nombreuse assistance qui est venue s'associer à la messe offerte pour le repos d'une âme, dont la vie terrestre, toute de dévouement dans la discrétion et l'humilité, est certainement de celles qui ont la préférence du Seigneur.

* * * * *

Notre bulletin a déjà publié un appel en faveur de la nouvelle fondation d'une "Maison de l'Espéranto". Il le renouvelle aujourd'hui et il m'appartient d'insister sur l'importance que nous devons attacher à cette initiative. Les bureaux de la rue de Chabrol à Paris ont été pour beaucoup d'Espérantistes de passage un point de rencontre, et malgré la vétusté de l'immeuble, un centre de vie très important pour les groupes qui pourraient s'y réunir, pour les collections de livres et revues qu'on pourrait y consulter, pour toutes les informations sur le Monde Espérantiste qu'on pourrait y recueillir.

En participant à cette collecte, les membres de notre Association ne feront pas seulement un geste d'amitié.

Ils apporteront une contribution indispensable à l'existence d'un lieu de travail, de rencontre, d'archives, d'une "maison pour tous" où il sera aisément de puiser les informations, la documentation, d'exercer les activités diverses que réclame l'action, où les étrangers de passage pourront être accueillis.

.../...

.../...

Ils le feront comme les groupes de toutes natures, qui comme nous, avec nous, œuvrent dans leur milieu pour que vive et se développe la langue internationale, en même temps qu'une culture universaliste, étayant un idéal de Paix et de Fraternité humaine.

Il y a là un devoir de fidélité à la mémoire de notre amie regrettée, Yvonne Paulier, qui a consacré tant d'années de sa vie à une permanence qui doit continuer, et qui appelle la création d'un cadre reflétant mieux encore ce monde si divers, uni cependant par une même volonté de compréhension amicale.

Nous avons lancé plusieurs appels à nos membres, pour que chacun contribue personnellement à l'effort commun des diverses Unions qui participent à la diffusion de la Langue Universelle, en la pratiquant, en la faisant connaître, en l'enseignant.

Le succès de notre action à tous est subordonné à la réunion, au groupement des actes de chacun dans une marche commune vers le but poursuivi.

R. CL. COLAS.

xx

LA AGANTA SPIRITO :
=====

..." En elle, en effet, est un esprit intelligent, saint, unique, multiple, subtil, agile, pénétrant, sans souillure, clair, impassible ami du bien, acéré, incevable, bienfaisant, ami des humains, constant, ferme, sans souci, qui peut tout, surveille tout, pénètre tous les esprits, les intelligents, les purs, les plus subtils. Car plus que tout mouvement la Sagesse est mobile; elle traverse et pénètre toute grâce à sa pureté. Elle est un souffle de la puissance divine, une effusion toute pure de la gloire du Tout-Puissant; aussi rien de souillé ne pénètre en elle. Elle est un reflet de la lumière éternelle, un miroir sans tâche de l'activité de Dieu, une image de son excellence. Bien qu'unique, elle peut tout, sans sortir d'elle même, elle renouvelle toutes choses. Elle se répand au long des âges dans les âmes saintes, elle en fait des amis de Dieu et des prophètes; car Dieu m'aime que celui qui vit avec la Sagesse. Elle est en effet, plus belle que le soleil, elle surpasse toutes les constellations; comparée à la lumière, car la lumière fait place à

.../...

... / ...

la nuit, mais contre la Sagesse le mal ne saurait prévaloir. Elle déploie sa force d'un bout du monde à l'autre et d'une manière bienfaisante régit l'univers.

(Sagesse : 7-22, 8-1)

Ni meditu :

Kion la antikvuloj nomis saĝeco, tion la kristanoj agnoskas kiel la Sanktan Spiriton. Ni tiel legos la proponitan tekston, en dankema sinteno. Jes, konsiderante ĉiujn eĉojn donitajn al la Saĝeco, mi agnoskas la Spiriton, kiu agas en mi kaj en la mondo. Mi laudas la Sinjoron, petante Lin, ke Li donu al mi koron sufice puran, por ke mi ellasu Lian Spiriton konvinki min.

(EL Vie Chrétienne N° 141)

G U T O D A A M O .

Estas necese ~~afte~~ mediti pro la Vorto de la Sinjoro, precipue pri la ordono : "Ami vin unuj la aliajn". Sed pli necese estas ame agi. Vanaj estas la paroloj, la deziroj, la sentoj, se kutime oni ne agas konforme al tiuj paroloj, deziroj, sentoj.: Primedisti la Vorton de Jesuo estas bone; pli bone estas mediti pri la maniero efektivigi liajn ordonojn. Opi ne hezitu eniri en la detalojn. Jen trafa ekzempl^r, kiu efektiviĝas en la rilatoj inter la esperantistoj. Oni ~~afte~~ rimarkas en universalaj kongresoj, ke multaj estas la esperantistoj, kiuj ne sufice bone prononcas la internacian lingvon. Tio devenas de la fakto, ka la esperantistoj ne havas sufice da okazoj por paroli unuj kun la aliaj. Des pli tio montras, ke ĉiu esperantisto devas ekzerciĝi al bona prononco. Kial ne ĉiutage legi la ^{la}utvoĉe unu ĉapitro de la Sankta Biblio ? Tio estus bona kutimo, kiu ebligus la kontaktojn kun la Sanktaj Skribajoj, kaj la pli bonigon de nia prononco de Esperanto... Ni faru tion pro amo al niaj gesamideanoj !

R. D.

Novaj membroj 1972

8)- S-ro Matzinger Jean-Marie (Bas-Rhin)

Ĉ E L A J U N U L O J .

Iaj junuloj eklernus Esperanton, se ili scius, ke ĝi vere ekzistas, kaj estas parolata en ciuj landoj.

Unue, necesas veki intereson ĉe kunuloj. Tien povas facile fari junuloj, kiuj partoprenas la vivon en laborkampejo dum la somerferioj.

Se du Esperantistoj loĝas en la sama ĉambro, aŭ estas anoj de la sama taĉmento, ili utile parolas Esperanton atentante, ke ilia pronomco estu harmonia kaj belsona.

Unuatempe kelkaj kunuloj opinias, ke ili parolas ian sudfrancan vilaĝan dialekton; iom post iom la kunuloj miros pri la afero, kaj demandos, el kio la lingvo konsistas. Tiamaniere oni povas semi.

Poste rikoltos la Esperantistaro :

"Sub la sankta signo de l'espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj;
Kaj rapidu kreskas la afero
Per laboreo de la esperantoj."

D-ro Zamenhof.

Jean-Marie GUILLOU.

LA IKUE-KONKRESO 1972.

De la 16-a ĝis la 21-a de julio, ĝi okazis en Como (Italujo). Sindonema LKK sub la lerta gvidado de S-to Longoni preparis afablan akcepton en la impona kadro de la vila Olmo : luksa salono por la kunvenoj, kie la sacerdotoj ankaŭ kuncelebris la sanktan meson, escepte la dimanĉan, kiu okazis en la katedralo. Bela parko apud la lago ebligis promenadon aŭ ripozon en la pura aero de la montoj. Eĉ la itala suno benis nin !

Eminentuloj inter kiuj la urbestro venis saluti la 80 partoprenantojn. Ciuj solenaj aranĝoj inde reklamis por Esperanto, ĉiuj lokaj gazetoj abunde raportis pri nia kongreso. Certe reklamis por nia movado ankaŭ la balonetoj, kiuj ekflugis el niaj manoj.

En Milano akceptis nin la alta protektanto de la kongreso, ĉefepiskopo Colombo, kiu kune kun ni preĝis "Patro nia" (li ne estas esperantisto). Tie ni vizitis la faman katedralon kaj la trezoren

.../...

888 / 888

de Sankta Karlo Beromeo. Varmege estas en la urbo, sed agrable malvarmete en la preĝejoj.

La LKK aranĝis ankaŭ bonan distran programon : koncerto en la katedralo, arta vespero en la popola teatro, kie la trupo (ne esperantista) bone deklamis poemojn de Jacopone da Todi, Dante, Alfierri k.a., vespero en la loka klubo fondita de M-ro Violin, malnova esperantisto, kiu resumis la historion de tiu vigla societo. En la programo, muziko, deklamado kaj ... itala ĉampanvino.

La kongreso finiĝis per bela ekskurso sur la lago kaj banketo en restoracio ĉe ties bordo.

La kongresanoj ankau serioze^r laboris : projekto de konstanta oficejo, kie ĉiu povus informiĝi ricevis aprobon, same kiel la plibonigo de EK. kaj la forigo de financaj malfacilaĵoj.

La prezidanto de KELI deziras, ke la rilatoj komencitaj en Limburg daùru; ĉu la venonta kongreso estos komuna? Kie ĝi okazos? Beograd? Hungarujo? Neniu definitiva respondeo. Oni decidis aperigi unu komunan numeren E.K.-Dia Reago en la jaro.

E. VANNEAU.

10. The following table shows the number of hours worked by each employee.

La IKUE-KUNVENO EN PORTLANDIA. La prezidanto, S-teno Ciccantis, malfermas per "Patro nia". Poste, li raportas pri la kongreson en Cincinatti en unio kun la IKUE.

Pri EK, oni decidis ŝangi la presiston. La Poloj povas ĝin ricevi pere de S-~~t~~^o Paruzel. Por starigi de la mozaiko "Nia Sinjofine de la Espero" en Nazareto, la ĉeestantoj donacas 37 dolarojn.

Raportas la landaj sekcioj reprezentitaj.

Sr. De Beer salutas en la nome de KELT

SOMERO ...



POR PLI KAJ PLI MULTAJ HOMOJ, GI MALFERMAS LA PORDON AL LIBERTEMPO,
DUM KIU ILI MALSTRECIGAS, VIVANTE TUTE ALIAN VIVON OL KUTIME, PLENIGANTE LA
PULMOJN PER NOVA AERO, LA OKULOJN PER NOVAJ PEJZAGOJ, LA KOROJN PER NOVAJ
AMIKIGOJ ...




POR ALIAJ, GI SIGNAS LA KOMENCON DE PEZA, LACIGA LABORO

PLENIGANTE LA KORPOJN PER DOLOROJ,

LA GRENEJOJN PER GRENO,

LA KELOJN PER VINO ...



KE NI ESTU INTER LA UNUAJ AŬ LA DUAJ,
NI NE FORGESU TURNI NIN AL DIO, NI KLOPODU EN CIU SOMERTAGO DEDICI
KELKAJN MINUTKOJN AL SINCERA PREGO,
KIU PLENIGOS NIAJN ANIMOJN PER LA NECESA SPIRITA NUTRAJO,
PER LA GOJO DE KRISTO . . .

L I N G V A . . . A N G U L O .

La proponoj de nia julia numero ricevis tradukon de S-roj Dauchez (Da), Despiney (De), J.M. Guillon (G), Kraemer (K), Kaj S-ino Michau (M).

- 1)- réuspéter : grumbli (Da, K); grumblante protesti (De); vigle protesti (K); malkontente protesti (M).
- 2)- pleurer dans le gilet de quelqu'un : ĝemi ĉe ies brusto (Da); al iu veadi petante konsolon (De); konfidi al iu siajn ĉagrena-
jojn (G); plorgrimaci ĉe iu (K); konfidence plendi (M).
- 3)- un bon tuyau : tauga informo (Da); valorega informo (De); dubinda informo (G); konfidenca informo (K); trafa konsilc,
informo (M).
- 4)- une bande dessinée : rakonto per desegnajoj (Da); desegnita filmo (De); kolorilustrita rakontopaĝo (G); vivantaj desegnoj (K); desegnita bendo, desegnarankonto, (M).
- 5)- résérer à quelqu'un un chien de sa chienne : prepari venĝon (Da); teni rankoron kontraù iu (De); senti malkontenton kontraù iu (G); memori pri ia malbona afero (K); venĝeme redoni, rebati (M).
- 6)- avoir la police à ses trousses : esti serĉata de la policianoj (Da); estipersekutata de la polistaroj (De, K); havi la policon sur siaj spuroj (K); esti serĉpelata de la police (M).
- 7)- faire le pont : kvazaŭtempo libertempi inter du festoj (Da); senlabori inter du feriaj tagoj (De); ferii dum tago inter du festoj (G); pontferii (K); senlabore kunligi feritagojn, feriigi interfestan tagon (M).

La honorpalmen al S-ino Michau !

Dans le cadre de notre "lingva angulo", je voudrais aujourd'hui ouvrir une petite rubrique sur le sens de certains mots. Certes les espérantistes ne doivent pas être des puristes excessifs, mais l'expérience des congrès m'a appris que souvent certains mots étaient pris pour d'autres, ce qui est quand même fâcheux.

Voici pour commencer une liste de mots à ne pas confondre :

... / ...

.../...

jurnalo : c'est un journal quotidien comme par exemple "La Croix".
gazeto : c'est un périodique donnant des nouvelles d'actualité,
comme "Heroldo de Esperanto".

revuo : est une revue qui s'adresse à un public spécialisé comme
par exemple "Biblia Revuo"

bulteno : est un bulletin destiné aux membres d'une association
comme l'est "Franca Kocelike Esperantisto"

tagliblo : c'est le journal que l'on tient soi même, comme la "Tag-
libro de Anne Frank".

J.V.

\$

KONSILIA KUNVENO de la 24-a de Septembro 1972.

Ĝi okazis en Parizo la 24-an de Septembro en ĉeesto de S-ino Vincent, S-roj Colas, Despiney, Ligot kaj F-to Marmou. Petis senkulpigo : S-roj Barrier, Bessière kaj Ribot.

La prezidante malfermas la kunvenon je la 15.20.

Homaĝe al F-ino Paulier, kiu mortis la 1-an de Aŭgusto, oni preĝe silentas dum unu minuto.

Pri la protokolo de la lasta kunveno neniu petas aldonon. Pro tio la protokolo estas unuanime aprobita.

Post la alvoko por la Fonduso-Demo de UFE, jam kolektiĝis la sumo 435 Fr. Oni decidas fari la saman peton en la venonta bulteno.

Niaj financoj estas en bona stato. La katozej restos la samaj.

La nombr-o de la membroj estas nun 140.

Pri la bulteno F-to Marmou ricevis de S-to Cuarnier ilustritajn paĝojn, kiuj aperas en la oktobra numero.

F-to Marmou disponas pri stck-o da statutoj por la novaj membroj.

S-ro Barrier pro troj profesiaj laborej rezignas sian sekretariopostenon. De pro la furpaso de F-ino Paulier kaj la eksig-o de nia sekretario mankas du konsilianoj. Oni devas elekti du anstatau-antojn okaze de la venonta kongreso. Oni proponas la postenojn al kelkaj grupanoj.

F-to Marmou raportas pri la IKUE-kongres-o en Com. kaj pri la KELI-kongres-o en la Ruchette apud Melun.

S-ino Michau reprezentis IKUE en la Gresillon-a simpozio.

.../...

... / ...

En la Universala Kongreso en Portland ĉeestis S-ino Vincent kaj S-ro Despiney. S-ino Vincent raportas pri la diversaj religiaj kunvenoj.

S-ino Vincent anoncas, ke la kongres~~s~~ de la Franca Katolika Esperanto Asocio okazas en Parizo la 12-an kaj la 13-an de majo 1973, apud la fama preĝejo "Sacré-Cœur".

S-ro Ligot klarigas la aferon de la libroj de S-ro Tardieu. Li devos rilati kun S-ro Despiney por transdoni la librojn al la pariza federacio.

S-ro Despiney parolas pri la laboroj de la Gregora komisiono.
S-ino Vincent estimas ke la laboroj devos esti daùrigitaj ĝis la
preponita celo.

La meso por F-in• Paulier ekazos la 29-An de septembro. S-to Gerdé diservos.

La venonta konsilia kunvenos okaze la 26-an de noviembre 1972.

Post preĝo memore de Fine Paulier, la prezidanto fermas la kunvenon je la 17.20.

Protokolis R. Despiney.

INFORMOJ

... / ...

... / ...

- 5)- Nia religia konsilanto, D-ro G. Baudry , peras por la abonoj al "Biblia Revuo" Prezo : 30 Fr- p.ĉ.k.- Lille 47 04 43^a

Li volonte sendas al vi siajn verkojn :

 - a) P. Teilhard de Chardin - Bibliographie 25 Fr-
 - b) Qui était T. de Chardin? Introduction à sa vie et à son oeuvre 20 Fr-

Jam eldoniĝis ĉe Mame "Ce que croyait Teilhard" el la sama aŭtoro, D-ro Baudry.

N E K R O L O G I

Kun granda peno, ni informas pri la forpas• de nia fidela konsili-anino,
PAUL TEP Yuenne

PAULIER Yvonne

La Sinjoro realvokis ŝin la 1-an de aŭgusto, precize en la tago, kiam ŝi devis emeritiĝi; ĝis sia lasta spiro, ŝi vivis por nia idealo Esperanto.

Ni pregu por la ripozo de sia animo.

FONDUSO-DOMO (1-a lista)

- 1) S-ro Thiollière 50 Fr; 2) S-ino Cheverry 10 Fr; 3) S-ro Bessière
25 Fr; 4) S-ro Despiney 100 Fr; 5) S-ino Michau 100 Fr; 6) S-ro Kraemer
100 Fr; 7) S-ro Thiollière (2) 50 Fr; 8) S-ro Fardet 10 Fr; 9) S-ro
Liget 50 Fr; Sumo : 495 Fr.

La subscription d'auras : A.C.F.E.- p. E. k. - Rouen 23 24 93 K. -

E1 la Revuo KATOLIKA SENTO de Oktobro 1971 :

PROFESSOR ALVES DE MOURA, aŭtoro de "Kankero de la spaco", pri kiu jam aperis la dua interesega scienga volumo en la portugala lingvo, tre riĉa je bildoj kaj grafikaj, estas pasia esperantisto. Per sinsekvaj artikoloj li aktive propagandas en la portugala porleneja revuo "Resista de ensino liceal", la internacian lingvon. Jen liaj versoj dediĉitaj al :

ZAMENHOF

Estas homoj sur Ter^a hon-rindaj
kiui por ĉiam vivos memorataj

2020 / 2021

.../...

de ĉiuj geamikoj, kaj amataj,
pro siaj laboraĵoj meritindaj.

Tiuj saĝaj lertuloj estis indaj
Fariĝi de la homoj respektataj;
dum la viv' ili estis estimataj,
post la mort' ili estos memorindaj.

Zamenhof, jen saĝulo defendanta
la pacon kaj la bonon de l'homaro,
la kraino de lingvo paciganta.

Al li estas dankema la ularo,
Pro lia mirlaboro, parolanta
al la koro de ni, kamaradaro.

Septembr^o 1971

ALVES DE MOURA.

xx

KOTIZTABELO 1972

IKUE kun "Espero Katolika" 17 Fr
IKI kun "VOJO, Ver^o, Vivo" 5 Fr

Peranto : G. Véron, C.C.P. - Rouen - 11 88 63 Z.-

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 5 Fr
infano malpli ol 16- jara 2 Fr
Membro bonfaranto 25 Fr
Dumviva membro 100 Fr
UFE kun "Revue Française" 35 Fr
UEA kun "Esperanto" kaj "Jarlibro" 50 Fr

C.C.P.-Association Cath. Franç. pour l'Espéranto,-Rouen-23 24 93 K.-
p.ç.k.-

=====

Dépôt légal : 4^o trimestre 1972 /// P^olycopié par : F.M.C.
Papier de Presse N° 34.745- /// Prieuré Saint-Martin
Directeur-Gérant : Gaston VERON /// LA HOUSSAYE EN BRIE
 /// 77610 FONTENAY-TRESIGNY
 FRANCE

=====